# JEN

BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO

Numero #2 — 30 Ave B, NYC 9, NY USONO — Aŭgusto 1962

## TOLEREMO KREAS

Kare kaduka estas mia loĝejo. Sen romantikigo ĝi restus nur povra duĉambra blat-ĝardeno, vera ĉielo por malaltaj vivformoj (inklusive min), sed per iomete da garnituro ĝi transformiĝas en komfortan hejmon. La garnituro, kiun mi aludas, kostas nenion. Temas pri la potenco de la homa cerbo fari el sia ĉirkaŭaĵo aŭ floran palacon, aŭ infernan tormentejon, preskaŭ laŭvole. Tiele la jarcentmezaj poetoj en Francujo rigardis sian mondon, kaj randradioj de ilia arto falis eĉ sur min. Ĉu mi troas? Ne... toleremo kreas. Sed antaŭen...

Mi klasifikis mian loĝejon "duĉambra" sed vere... multaj banĉambroj pligrandas ol mia dua ĉambro. Grandan skribtablon mi enŝovis... ĝi estas lumigata per tre impresa fluoreska lampo, kiu faras belan, abelsimilan sonadon; se oni tendencas al muziko oni povas harmonie kunzumi. La rezulto ne estas malsimila al Skota kantsakmuziko. La skribtablo, tiamaniere lumigate, regas la ĉambron space kaj forme; aliajn meblaĵojn mi eĉ ne povas pripensi. Mi ne pasigas multe da tempo en tiu malgranda karcero, sed preferas sidi en la alia, pli komforta kaj spacdona ĉambro, al kiu mi donis la nomon "ĝenerala ĉambro". Certe, oni ne rajtas nomi ĉambron "kuirejo" aŭ "salono" se ĝi enhavas bankuvon! Estas fenomeno de mia najbareco. Ĝi ankaŭ enhavas lavmaŝinon; ties motoron mi elprenos kaj afiksos alojn por havi ventumilon dumsomere. Sed ho bankuvo! Kun vi, kion fari? El antikva tirkestaro mi faris libroŝrankon... kion mi povas fari el mizera bankuvo? Ĉu boaton?

Ĉe la komenco de mia enloĝanteco estis sur la bankuvo tre peza plato el porcelan-kovrita ŝtalo. Ĉar la kuvo staras rekte apud la lavujo, mi devis uzi la platon kiel tablon por kuir- kaj manĝiloj, kaj por dentobroŝo, razilo, kaj alia galanterio. Nu... en tiuj fruaj tagoj mi ne banis min multe. La plato, jam sufiĉe peza, ĉiam estis ŝarĝita per la mil objektoj necesaj por ĉiutaga vivado. Translokigi la aĵojn iom post iom estis agaco. Sed translokigi la platon kun surhavo entute, estis defia tasko. La situacio estis terura! Sub artefikaj pretekstoj mi vizitadis miajn amikojn por bani min lukse en iliaj banĉambroj. Foje mi iris al la YMCA nur por bani min. Sed fine mi trovis solvon: mi prenis la ŝtalplaton de sur la bankuvo, kaj metis ĝin sur du skatolojn, farante manĝtablon, kaj sur la kuvon mi metis 4,5 negrandajn tabulojn. Tiel, tabulon post tabulo, mi ebliĝis simple trans-lokigi la vivartikolojn iam, kiam mi deziris varme akvumi mian korpaĉon...

Tiu malkovraĵo tiom ekcitis min, ke mi priskribis ĝin en letero al la redaktoro de "Vilaĝa Voĉo" (loka ĵurnalo), konsilante aliajn, kies kuirĉambroj enhavas bankuvojn, fari same. Je mia surprizo oni presis la leteron, kaj nekonata najbaro ensendis respondon: "La malkara loĝado havas siajn avantaĝojn...se vi estas riĉa, vi fariĝas riĉega; se vi estas malriĉa, vi postvivas almenaŭ." Mi devis admiri lian praktikan sintenon, sed li ne menciis, ĉu li povas utiligi mian konsilon...

Nun mi kondukas militon kontraŭ la blatoj. Ili manĝas plimulte ol mi. Mi ja rimarkis, ke se mi ne manĝas, ili ankaŭ ne manĝas. Sed ili vivdaŭras, dum mi malsaniĝas pro nesufiĉa nutrado... eble ili kaŝas manĝaĵon, kiel la sciuroj. Almenaŭ mi povas ĝoji, ke ili ne uzas mian skribmaŝinon dumnokte, kiel la fama blat-poeto de Don Marquis. (Mi supozas, ke ties blatdevena poezio faris bazon por nia moderna senmajuskla poezio, ĉar la blato ne havis la forton premi la majuskloklavon).

Do: se iu leganto aŭ legantino konas sciencan rimedon kontraŭ ĉi tiuj pestaj mortrezistemaj bestetoj ensendu, ĉar mi jam komencas ŝati ilin kaj eĉ interparoli kun ili... tion oni nomas, ne frenezeco, sed interrasa kompreniĝo. Toleremo kreas...

Kaj tiu, kiu scias, kiel kvietigi fluoreskan lampon, ensendu...

Kaj tiu, kiu scias ion ajn, ENSENDU...

La redaktoro

---

Rabeno (al studento): Judo ĉiam respondas demandon per demando. Ĉu vi scias, kial Judo ĉiam respondas demandon per demando?

Studento: Ne, kial?

Rabeno: Kial ne?

## LETERO AL HUMANISTO

"Kara Amiko,

"Defendante koncepton pri homfamilieco vi atentigis pri la supozata 'ĝenerala' homo kiel pruvite per timoj, esperoj, ktp. kiujn posedas ĉiuj membroj de la klaso 'homo'. Bone -- tio estas nekontraŭdirebla. Vi ankaŭ faras komparon inter la homaro kaj ordinara familio. Nu mi konsentas ke ne estas malfacile, pensi pri ĝenerala abio aŭ ĝenerala formiko (krom se vi hazarde estas abio aŭ formiko), tamen estas defia tasko enmensigi figuron de ĝenerala Smith aŭ ĝenerala Jones. Pro tio la interkomparo estas netrafa kaj efektive malfortigas vian vidpunkton. Ni supozu ekz. ke ĉiu Smith kaj ĉiu Jones estas unu el 100 gefratoj. Ankoraŭ malfacile, ekstrakti Smith aŭ Jones ĝeneralan. Vi povas antaŭvidi la finon de tio ĉi; sekva paŝo estu, ni diru, ĝenerala Usonano. Tute bone, se vi estas Franco, paroli pri ĝenerala Usonano. Sed se vi estas Usonano, vi ne povos utiligi la koncepton. Eble vi eĉ ofendiĝos. Konsiderante la tutan homaron... sendube dirus la proverba Marsano ion jenan: 'Ili ĉiuj kunsimilas, tiuj Teranoj. Ĉiuj malsatiĝas, ĉiuj manĝas, ĉiuj amas ion kaj ĉiuj malamas ion.' Sed vi kaj mi, estante mem homoj, bone scias ke tio ne bildas la tutan aferon. Aŭ pli ĝuste: estas ĉio, kaj ne estas ĉio.

"Ridindeco kuŝas en tio, ke vi ne parolas kiel Marsano farante tion, kion nur Marsano povus fari! Vi unuigas la homojn per ecoj konataj al vi nur pro via aneco en la aro; almenaŭ ĝis tiam, kiam vi ekmencias 'psikologiajn enketadojn" kaj 'observadon de la subkonscieco'. Klarvideble aliflanke, ke vi restas ano de la studata aro eĉ se vi mem faras la studon. Nuntempaj psikologoj akre konscias tion, kaj taŭge estas humilaj pri sia enketado.

" Elmontri eternajn kliŝojn ankaŭ ne valoras. Mi povas mencii kelkajn aliajn, egale eternajn titolojn; i.a. moralo, bono & malbono, Dio, justeco, heroeco... ĉu plaĉus al vi, uzi unujn el tiuj ĉi kiel unuigajn faktorojn? Jen vi, la semantikisto...

" Kaj ĉu kompato? Ĉu kunsento? Ĉu envio? Ĉu vi neniam kompatis malsatan hundon, nutris ĝin, kaj kunsentis ĝian ĝuadon de la manĝaĵo? Kaj miaflanke mi ofte enviis tiajn liberajn kreitaĵojn kiel agloj, gazeloj, ktp... ĉu? Oni ne devas aparteni al sama speco por kunemocii. Kaj pri frateco... ĉimpanzo staranta 12 minutojn sur monteto studante krepuskon (Scientifc American antaŭ proks. 3 numeroj) estas pli apude mia frato ol Lincoln Rockwell, Cezaro, senespera frenezulo... aŭ mia apudpordulo. Ĉu mi troas? Tute ne. Nature, mi estas homo. Sed plej signife al mi estas, konsideri min kiel vivantan estaĵon unue kaj kiel homon due. Kial? Elemento de hazardeco. Tio, ke mi vivas, ŝajnas malpli hazarde ol tio, ke mi estas homo (mi ne certas pri la impliko de tio, do ignoru ĝin). Mi deziras al poetoj ankaŭ, ke ili pensu precipe kiel vivformoj. Trarompas multajn mensbarilojn...

" Parenteze ni tute ne estus malkonsentinta ĉe la komenco, se vi estus dirinta ion simplan, kiel 'mi estas homo' aŭ 'mi estas internaciisto". Sed per uzo de tia esprimo 'homfamilio', eĉ ne majuskle literigite, vi volas diri ion alian. Vi volas diri, 'ni ĉiuj partoprenas la homaran kondiĉon'. Tio veros, eble, ĉirkaŭ 2000 AD sed laŭ mi, ne veras nun. Ĉu vi eble kuraĝas difini la homaran kondiĉon? Por ĉiuj, ĉiaj, ĉie?

"Al mi tute nekompreneble estas, kial retorikaj, semantike netrafaj esprimoj kiel 'familio" kaj 'frateco' trovas lokon en via pensado rilate al la homaro. Mi tenas, ke tio nur estas ĝenerale okcidentkultura anstataŭo je Dio. Mi tenas, ke strikte logika bazo samgrade mankas al ambaŭ konceptoj. Mi tenas, ke tre eble povas esti inter du homoj pli da diferenciĝo, ol inter du tute apartaj specanoj cetere en la bestara regno. Jen la unikeco de la homo. Mi ripetu: JEN LA UNIKECO DE LA HOMO. Lia menso kapablas plej vastan variecon rilate al adaptiĝo al la ĉirkaŭaĵo. Universalan fratecon, samkiel aliajn ĝeneraligojn, oni nur povas hipotezi; kaj laŭ mi ili ne povas formi realan bazon por homaj interrilatoj.

"Por ke mia sinteno ne miskompreniĝu, mi diru kelkajn vortojn pri antaŭjuĝo. Kiel Esp-isto (interalie) mi jelpas 'frateco' ne malpli laŭte ol iu ajn Humanisto aŭ Unitariano. Sed kiam mi uzas tiun esprimon, mi uzas ĝin por kombati proletan nescion kaj antaŭjuĝon, ne por anstataŭi Dion. Kaj tiujn homgrupojn, kiujn mi ŝatas, mi ne ŝatas pro 'frateca sento' sed simple pro ŝato. Mi rimarkis interesan fenomenon: plifacile estas, anstataŭi kontraŭan antaŭjuĝon per favoran antaŭjuĝo, ol per frateco toleremo. Kaj pli nature. Ĉar antaŭjuĝoj restas ĉe ni nur pro tio, ke neniea menso povas enhavi tutampleksan, absolutan konon. Do, kara amiko: pensu kiel vivformo en via universo, preferinde al serĉadi komforton en homfamilieco.

" Inter miaj nefavoraj antaŭjuĝoj (okaze ke vi scivolas) troviĝas: Sudusonaj konservativuloj, ruĝumitaj virinoj, turistoj (ĉiuspecaj), ateistoj, ĵuseksfumantoj, profesoroj kiuj verkas poezion (aŭ kritikas ĝin) (krom C.W.Bowra) (aŭ iu ĉe Oxford aŭ Cambridge) kaj geedzeco.

Sufiĉe... VALE."

---

Profesoro: Kiel oni diras "wolf" en Esperanto, ĉu vi scias?

Studanto: Certe: malŝafo...

## NI PETAS PARDONON

...pro kelkaj fusaĵoj en nia unua numero. Plejparte tiuj estis kopieraroj resultaj de trorapidemo, sed misuzo de la verbo "manki" sur la unua paĝo estis vera eraro gramatika; Nov-Jorko ne povas manki ion, sed io povas manki al Nov-Jorko. Ni ne volas, ke studentleguntoj mislernu pro niaj misuzaĵoj, do...ni promesas pli zorgeme atenti.

---

## PAUL KLEE: MUZIKISTO

Paul Klee samgrade altetaksis siajn desegnaĵojn, kiel siajn kolortolaĵojn, kaj nur per kelkaj esceptoj vole ellasis ilin al la ĝenerala publiko. Ja longe ŝajnis, ke li naskiĝis al metio desegna kaj grafikarta, kaj li mem kredis tion ĝis sia 25a jaro. Li fakte atingis aĝon de 30 jaroj, antaŭ ol la ideo pri koloro eniris lian vivon. Tio okazis dum vojaĝo al Kuiran en 1914. Sed eĉ post tiam Klee provis kaj pruvis siajn konceptojn plejparte desegne, tiel farante bazojn por postaj pentraĵoj, ĝis fine la nombro de desegnaj verkaĵoj preterpasas 3000...

Multajn impresajn spertojn li ŝuldas al muziko: li mem estis lerta violonisto, kaj por li, ĉeestado de koncertoj kaj operoj ne estis distrado, sed vigla enketado pri esto kaj estiĝo de la arteca formo.

Klee vere estis musikisto inter plastikartistoj de la 20a jarcento, ne pro transigo de artreguloj de unu formo al la alia (kio estus neeble) sed en la senco de eknovigo de la pentroarto el la spirito de ĝiaj propaj elementoj, celante vastan kaj sendependan formigadon el simboloj aŭ ĉifroj, kiuj similas al la reala mondo kaj al muziknotoj. La interstreĉo ekzistas inter tiuj simboloj samkiel en la muziko inter la individuaj notoj.

Preskaŭ 20 jaroj pasis, antaŭ ol Klee atingis sian celon. Per la evoluigo de sia grafika pero li trovis eblecon por memregulantaj figurdeklaroj, en kiuj videblaĵoj ne ludas pli gravan rolon ol la nevideblaĵoj. Klee vidas objekton aŭ temon ne sole de ekstera, sed samtempe de interna punkto, kaj prikonscias ĝian aliformiĝadon. Ekzemple ĉe vegetaĵo: lin interesas, prezenti la "strukturon de la kreskada stato;" ĉe ŝipvojaĝo, lin interesas, fiksi la diversajn movadjn de la pasaĝeroj, de la ŝipo, de la akvo, de la tero mem kaj de la astroj. Eĉ maldaŭreco estas por Klee realigebla, kaj li aludas la genezon de la skribarto kiel ekeston de ĉia movado. Tiele aliiĝas la signifo de la figurkreado; la arto ne plu nur videbligas la mondon, sed revelacias nevideblaĵojn.

Klee pritraktas aĵojn, kiuj efektive ne ekzistas, kiuj tamen eblecas ekzisti; kaj plivastigas nian konscion, por ke ĝi ampleksu ankaŭ la nevideblan mondon. El la mondo de kondiĉa fineco, fariĝas mondo en flekso, mondo ĉiuhore renoviĝanta.

---el la Germana de Will Grohmann

---

## ************ PIKNIKO *************

PIKNIKO ESPERANTISTA........................................FT TRYON PARK, NYC

La 9an de Septembro (Dimanĉo)
Je la 2a.

La grupo kunvenos ĉe la kutima loko (aŭ razeno)...Telefonu S-ano Bonesper LO7-9924 por detaloj.

Ciuj Invitataj

---

## SOCIALA VESPERO

neformala de JEN okazos ĉe la hejmo de Samideano Josefo Blitz 490 West End Ave, NY24, Apt 5A, je la 2a posttagmeze la 16an de Septembro, Dimanĉo.******************
(Membraro de JEN sole invitata)

FORLASU VIAN NACIAN LINGVON ĈE LA PORDO!

---

Aliĝu al JEN
Aliĝu al ELNA
Aliĝu al UEA